

Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

28-a Jarkolekto * Junio 2012 * N-ro 96

ISSN 1576 - 0618



ÁLORA

Natura juvelo en la Malaga montaro

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
17-a Andaluzia Kongreso de Esperanto Granado 2012	7
Rafaelo Mateos instruis esperanton en Turkio	10
La Korto de la Leonoj ĉe la Alhambro en Granado ..	12
Lingva Angulo	15
Poezio	20
Turismi en Álora (Malago).....	21
Paĝoj pri nia historio	26
Andaluzia Kuirarto	29
Flamenko.....	30
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio.....	32

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



MALAGO

La pasintan monaton julion la Urbodomo de Malago promesis studi la peton, prezentita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, cele la nomigon de strato en tiu urbo pere de la nomo *Doctor Zamenhof*. Nia asocio konkrete petis doni la nomon de la aŭtoro de la internacia lingvo al nuntempa sennoma promenejo ĉe la parko “*Jardines de Puerta Oscura*”, ĝuste malantaŭ la Urbodomo.

Ekde la 6-a jardeko de la pasinta jarcento, jam ekzistas en Malago strato nomita *Esperanto*. Espereble post kelke da tempo ekzistos nova ZEO (Zamenhofa aŭ Esperanto Objekto) en Andaluzio.

KORDOVO

Koincide al la okazigo de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo (Vjetnamio) la pasintan monaton aŭguston, aperis la 11-a numero de la revuo *Jura Tribuno Internacia*. Ĉi tiu faka revuo estas la oficiala organo de Esperanta Jura Asocio, grupo kie renkontiĝas la geesperantistoj kiuj laboras en juraj medioj. La revuon kuneldonas Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Sub ĉi tiu dek unua numero estos eble legi artikolojn pri la kunofialeco de la lingvoj en Hispanio, pri la internaciaj adoptoj, pri la vorto “hipoteko” kaj mallongaj informoj pri juraj kaj internaciaj aferoj.

Se Vi laboras ĉe juraj medioj (advokatoj, juĝistoj, jur-studentoj, ktp.) ne hezitu peti ekzempleron de *Jura Tribuno Internacia* al:
Esperanta Jura Asocio esperanto14@ono.com

MALAGO

La pasintan monaton majon vizitis Malagon José Antonio del Barrio, Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. Li profitis propran laborvojaĝon por renkontiĝi kun la Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj kelkaj membroj de la malaga E-grupo. La vespero finiĝis pere de donaco de libroj fare de la Prezidanto de HEF al nia asocio.



José Antonio Del Barrio, Prezidanto de HEF, kaj Ángel Arquillos, Prezidanto de AEU
Malago, julio 2012

SEVILO

La pasintan monaton junion nia onuba samideano Rafaelo Mateos organizis intensan kurson de esperanto en la Publika Biblioteko “*Infanta Elena*” de Sevilo, trideko da homoj ĉeestis, inter ili kelkaj eksterlandanoj. La kurso ja sukcesis kaj pro tio la respondeculo de la biblioteko petis la organizon de nova kurso inter la monatoj septembro kaj decembro 2012. Ĉi-foje oni organizos du grupojn, la unua dummatene lunde kaj vendrede de la 10:00 ĝis la 12:00 horo, la alia dumvespere, lunde kaj merkrede de la 17:00 ĝis la 19:00 horo. La kurso daŭros du monatojn, ĝis la 21-a de decembro. Se vi deziras pliajn informojn vizitu jenan fejsbukan paĝon:

<http://www.facebook.com/notes/biblioteca-p%C3%BAblica-provincial-infanta-elena-de-sevilla/curso-de-esperanto/10151132979054477>

ARUNDO (Malago)

Ĉe la kultura centro *Babá* en Arundo (Malago), komenciĝis nova elementa kurso de esperanto, organizata de la Arunda Esperanto-Klubo. La elementa kurso okazas ĉiumarde de la 17:30 ĝis la 19:00 horo. Ĉi-jare oni organizas ankaŭ perfektigan kurson, okazanta ĵaŭde, same de la 17:30 ĝis la 19:00 horo. La instruistino de ambaŭ kursoj estas nia samideanino Fátima Jiménez. La kultura centro *Babá* troviĝas ĉe la strato Granada 33 en Arundo (Malago).



CLASES de **ESPERANTO**

**ESPERANTO
IDIOMA
INTERNACIONAL**

de la Asociación Andaluza de Esperanto.

Martes. 17:30-19:00. Nivel básico.
Jueves. 17:30-19:00. Nivel intermedio.

Aprobado por la UNESCO
Fácil de entender
Fácil de aprender
Neutral.

Organizado por el Club de Esperanto de Ronda con la colaboración de la Asociación Andaluza de Esperanto.



Centro Babá

Cl Granada, 33 - Ronda
www.centrobaba.es
Tel. 952 87 43 94



Principales cualidades de Esperanto

Internacional: El Esperanto principalmente es útil para la comunicación entre personas de diversas naciones cuando no tienen una lengua materna común.

Neutral: Esperanto pertenece a ningún pueblo o país y por eso funciona como idioma neutral.

Igualitario: Cuando se usa Esperanto uno se siente al mismo nivel desde el punto de vista lingüístico, en comparación con usual, por ejemplo, el inglés, para hablar con una persona que tiene esta lengua como materna.

Relativamente fácil: Gracias a la estructura y a la construcción del idioma es normalmente más fácil empezar a hablar Esperanto que cualquier idioma extranjero.

Vivo: El Esperanto evoluciona y vive igual que otros idiomas y permite expresar los más diversos aspectos del pensamiento humano y sus sentimientos.


MALAGO

La 1-an de oktobro komenciĝis ĉe la malaga kultur-centro “Casa Invisible” baza kurso de esperanto, gvidata de nia samideanino Carmela San Segundo. La kurso okazas ĉiuvendrede je la 19-a horo. La Casa Invisible troviĝas ĉe la strato Nosquera 11 en Malago.

ECOLOGISTAS
 en acción
 malagaecologistasaccion.blogspot.com


CURSO DE ESPERANTO

LENGUO INTERNACIONAL, FÁCIL, LÓGICO, NEUTRAL Y VIVO



Todos los viernes a partir de octubre
 19.00h
 La Casa Invisible
 c/ Nosquera 11, Málaga

Más información: karmela.esperanto@gmail.com

Organizan: Ecologistas en Acción Ciudad de Málaga
 Colabora:  invisible

aeu

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto

Notu la adreson de la TTT-paĝo de nia asocio
www.esperantoandalucia.com



17-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO GRANADO

De la 15-a ĝis la 16-a
DECEMBRO 2012



Patronato de la Afantracia y Generalita
CONSEJERÍA DE CULTURA Y DEPORTE

Web: www.esperantoandalucia.com

Blog: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Definitive, la 17-a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazos en la urbo Granada dum la semajnfino, 15-a kaj 16-a de decembro 2012. Malgraŭ la fakto, ke ankoraŭ oni devas solvi kaj plenumi diversajn farenadojn, ni povas anonci provizoran programon, kiu pli malpli restos ĉi tiel:

Sabato, la 15-an de decembro

La kongresejo malfermiĝos je la 10:30 horo.

- 11:00 Saluton kaj bonvenon fare de la organizantoj kaj reprezentantoj de la diversaj grupoj.
- 11:15 La estraro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo prezentos la nuntempan situacion de esperanto en Andaluzio.
- 11:30 Prezento de la libro *mediteraneaj eroj* kies aŭtoro estas Ángel Arquillos.
- 11:45 Prelego de Pablo Foche “Linukso kaj libera softvaro”.
- 12:45 “Sur la spuroj de García Lorca”, prelego kaj deklamado de poemoj fare de Miguel Fernández.
- 13:45 Komuna Kongresa Vespermanĝo.
- 17:00 Magia spektaklo en esperanto.
- 17:45 Prelego de Rafaelo Mateos.
- 18:30 Prezento de la vizito al la Alhambro, fare de José María Rodríguez.
- 19:30: Nokta vizito al la Alhambro.



Dimanĉo, la 16-an de decembro

Dummatene ni promenados kaj matenmanĝos ĉe la Albajcina kvartalo kie nia samideano Indalecio Segura prezentos dancan spektaklon. Revene al la kongresejo (horo decidota) José María Rodríguez prelegos pri Flamenko. Post la parolado, la flamenka kantisto Ivan Centenillo, kune kun gitaristo, havigos al ni kelkajn flamenkajn kantaĵojn.

13:00: Fermo de la Kongreso.

Apudaj programeroj:

- Intensa elementa kurso de esperanto fare de Rafaelo Mateos.
- Ordinara Kuvenco de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.
- Ekspozicioj pri literaturo kaj filatelo en esperanto.
- Libro-servo.



La Kongreson organizas Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kun la kunlaboro de:



Patronato de la Alhambra y Generalife
CONSEJERÍA DE CULTURA Y DEPORTE

RAFAELO MATEOS INSTRUIS ESPERANTON EN TURKIO

Okazis en la turka urbo Gaziantepo la 5-a Mezorianta Kunveno de Esperanto, organizata de la Esperanto-klubo de la lernejo “Uskudar American Academy”. Ĉeestis kvardek homoj, la plej nombra grupo kompreneble de Turkio mem, sed aliaj ankaŭ de Israelo, Maroko kune kun gastoj de la kvin kontinentoj.

Dum la kunveno nia onuba samideano Rafaelo Mateos organizis kurson de esperanto, ni devas elstari la fakton, ke Rafaelo jam instruis dum la lastaj monatoj la internacian lingvon en Kordovo, Motrilo, Feso (Maroko) kaj nun en Turkio. La programo de la kunveno baziĝis sur prelegoj kaj turismaj vizitoj. Unu el tiuj prelegoj estis tiu de Rafaelo Mateos, kiu parolis pri la lingvaj problemoj de araboj kiuj lernas esperanton, ĉefe pro la malfacilo distingi en esperanto inter “i” kaj “e”, kaj inter “o” kaj “u”, el la vidpunkto de arablingva parolanto plejeble Zamenhof uzis “tro” da vokaloj kiam li elpensis sian lingvon.



Gepartoprenantoj, ĉefe junaj, en la Mezorianta Kunveno de Esperanto. Turkio, aprilo 2012.

Aliaj prelegoj temis pri konstruitaj lingvoj, pri la nova ŝtato Suda Sudano kaj pri vojaĝo de esperantista paro en Sud-Amerikon.

Rilate la turismajn vizitojn, la ĉefan ekskurson oni organizis por viziti *Halfeti*, kie malnova vilaĝo subakviĝis post la konstruo de digo sur la river Eŭfrato.

La venontjara Mezorianta Kunveno plejble okazos en Armenio kaj post du jaroj, laŭeble en Maroko. Tie sendube, nia onuba samideano Rafaelo Mateos estas vigla motoro de la tiulanda naskiĝanta esperantistaro.

HUMURO



LA KORTO DE LA LEONOJ ĈE LA ALHAMBRO EN GRANADO

Sendube, la plej konata bildo de la Alhambro en Granado, estas tiu kie aperas la korto de la leonoj. Dum la lastaj jaroj, la estraro de la Fondaĵo reganta la monumenton malpermesis la eniron en ĉi tiun korton, pro la fakto, ke oni devis restaŭri la leonojn kaj ankaŭ la basenon situita sur ĝi, tie el kie elfluis la akvo. Tamen, antaŭ kelkaj monatoj la laboroj cele la restaŭradon finiĝis kaj jam estas eble, denove, viziti la famegan korton de la leonoj.



La Alhambro en Granado,
la plej vizitata monumento en Hispanio

Kiel dirite, la fontano troviĝas meze de korto. Ĉirkaŭ la korto starigas 124 kolonoj el marmoro. Oni ekkonstruis ĝin en la jaro 1377, sub la rego de la Emiro Muhamado la 5-a. Kvar salonojn oni konstruis ekstere de la korto: la salono de la mozaraboj, de la reĝoj, de la du fratinoj kaj fine tiu de la *abencerrajes*. La orientiĝo de ĉiu salono ebligis ĝian komfortan uzon dum ĉiu sezono fare de la emiro kaj lia kortumo.

Ĉirkaŭ la fontano aperas 12 leonoj, el iliaj buŝoj elfluas la akvo. Sur la baseno oni gravuris poemon en la araba lingvo verkita de Ibn Zamrak:

“Benata Tiu kiu donis al la emiro Muhamado belajn ideojn por plibeligi liajn domojn”

Verŝajne la fontano reprezentas judan simbolon, la dek du taŭroj kiuj subtenis la fontanon konstruita de Salomono ĉe la Jerusalema Templo. Eble la dek du leonoj ankaŭ reprezentas la dek du tribuojn de Izraelo subtenantaj la Judean Maron. Tiel, oni diras, ke la leonoj troviĝis ĉe la palaco de Samuel Ibn Nagrella, juda altrangulo loĝanta tre proksime al la Alhambro, kaj la emiro Muhamado la 5-a uzis ilin por sia palaco kiam li ordonis la konstruon de la korto.

Ne nur la fontano, sed la tuta korto estas plena je paradizaj simboloj. Sur la biblia libro Genezo, oni parolas pri la rivero kiu fluis el la Paradizo, de tie ĝi dividiĝis en aliaj kvar riveroj. Same, ankaŭ el la fontano komenciĝas kvar kanaletoj kiuj el la fontano trapasas la tutan korton.



Siafoje, la leonoj reprezentas la saĝecon kaj la justicon de la juda reĝo Solomono, kiu ankaŭ estas la profeto Sulejmano por la islamoj. Eble, la fontano estas la tiel nomita “Maro de bronzo” de la Jerusalema Templo, granda baseno subtenita de dek du bovoj.



La fontano de la Korto de la Leonoj ĉe la Alhambro en Granado

Alia sciinda afero rilate ĉi tiun korton en la Alhambro estas la situigo mem. La korto orientiĝas laŭ la kvar ĉefpunktoj kaj la leonoj, triope, orientiĝas norden, suden, orienten kaj okcidenten. Laŭ la astrologia vidpunkto la dek du leonoj reprezentus la dek du zodiakajn signojn kaj ankaŭ la sun-movadon: do la eternecon mem.

Multaj aliaj teorioj pri ĉi tiu belega korto eblas. Sed sendube, tio kio ja gravas, estas la fakto, ke ĝi estas belega korto ĉe la plej konata kaj vizitata monumento en Hispanio. Verŝajne, la gepartoprenantoj en la proksima Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazonta meze de decembro en la urbo Granado, havos la eblecon miri ĝin dum la planata nokta vizito.

Lingva Angulo

La U-finaĵo en la verboj

Memoru, ke la verboj finiĝas per –U kiam ili montras, ke la ago ne estas reala, sed dezirata, ordonata, petata aŭ celata. Kompreneble, tiu ago troviĝas en la estonteco. La verbo povas aperi sen subjekto, kompreneble, tiu kiu ricevas la ordono aŭ la peto, estas la subjekto mem en tiuj frazoj:

- *Studu !* Ankaŭ eblas diri: - *Vi studu !*

Sed kelkaj aliaj subjektoj eblas:

- *Mi komprenu !* (temus pri mem-ordono).

La subjekto ankaŭ povs esti ONI, en tiu kazo, ni dezirus sciigi pri ĝenerala peto, deziro aŭ ordono:

- *Oni ne parolu laŭte, se oni ne deziras ĝeni la malsanulojn.*
(Que no se hable alto, si no se desea molestar a los enfermos).

La u-finaĵo ankaŭ povas aperi ene de demanda frazo:

- *Ĉu ni studu la lecionon?*

En ĉi tiu frazo aperas demando pri volo aŭ ordono, oni ne deziras scii ĉu ni studos la lecionon, sed male, se ni havas la devon aŭ se ni ricevis la peton / ordonon studi la lecionon.

La u-finaĵo en la verboj ankaŭ povas esti uzata en tiuj frazoj komencantaj per KE. Kompreneble la ĉeffrazo devas montri volon, ordonon, peton aŭ simile:

- *Mi volas, ke vi studu dum pli da tempo.*
(Quiero, que estudies durante más tiempo).
- *Li petis, ke mi estu atenta dum la tuta nokto.*
(Él -me- pidió, que estuviera atento durante toda la noche).
- *La profesoro ordonis, ke la gelernantoj ne parolu laŭte.*
(El profesor ordenó, que los alumnos no hablaran alto).

Se oni ne uzus KE-frazon, oni povus diri, ekzemple:

- *La profesoro ordonis ne paroli laŭte*
- *Li petis esti atenta dum la tuta nokto.*

Uzo de POR KE (kun la senco “celo”)

Se ni uzas “POR KE” la verbo devas finiĝi per U. Sed atentu, tiu *POR KE* tute ne similas al la hispanlingva “porque” (*ĉar* en la lingvo esperanto). Tiu *POR KE* montras kelkan celon.

Por ke → kun la celo...

- *Vojaĝu per rapida trajno, por ke vi povu esti en Malago morgaŭ mem.*
(Viaja en un tren rápido, para que puedas estar mañana mismo en Málaga).
- *Mi donacis al ŝi florojn, por ke ŝi komprenu, ke mi amas ŝin.*
(Le regalé flores a ella, para que comprenda que la amo).
- *Por ke la tuta mondo havu helpan lingvon, oni kreis esperanton*
(Para que todo el mundo tenga una lengua auxiliar, se creó el esperanto).

Oni povas uzi ankaŭ: POR TIO KE, tamen ne tro konvenas, por la abunda uzo de vortoj:

- *Mi donacis al ŝi florojn, por tio ke ŝi komprenu, ke mi amas ŝin.*

Ĉi lasta ne estus tre normala frazo.

En la KE-frazoj plus la verbo kun U-finaĵo oni povas uzi ankaŭ *krom ke* kun la hispanlingva traduko “sino que” kaj *kontraŭ ke* kun la signifo “en contra de que”.

- *Mi ne petas de vi, krom ke vi amu viajn gepatrojn.*
(No te pido, sino que ames a tus padres).

Ĉi-foje la senco de la U-verbo kiel deziro, peto, ordono estas tute klara.

- *La urbestro argumentis, kontraŭ ke la nova industrio malpurigu la riveron.*
(El alcalde argumentó, en contra de que la nueva industria contamine el río).

Sed atentu, oni ne devas aŭtomate traduki el la hispanlingva subjunktivo rekte al esperantlingva U-finaĵo en la verboj.

Ne ĉiam subjunktivo = u-finaĵo.

- *Tio okazis antaŭ ke mi naskiĝis.*
(Eso ocurrió antes de que yo naciera).

Ĉi-kaze en la hispana lingvo oni uzas la verbon en subjunktiva formo, tamen oni devas memori, ke la u-finaĵo en esperanto rekte rilatas al peto, ordono, deziro, celo... kaj en tiu hispanlingva frazo “antes de que yo naciera” rekte rilatas al is-tempo: *tio okazis antaŭ ke mi naskiĝis* (tute ne *naskiĝu*).

Same, se ni parolas pri –os tempo.

- *Vi devas aĉeti novan domon antaŭ ke via bebo naskiĝos.*
(Debéis comprar una casa nueva antes de que vuestro bebé nazca).

Aŭ se temas pri ordono aŭ peto:

- *Aĉetu novan domon antaŭ ke via bebo naskiĝos.*
(Comprad una casa nueva antes de que vuestro bebé nazca).

Ĉi-foje ekzistas nur unu peto aŭ ordono “*aĉetu novan domon*”. La hispanlingvan subjunktivan verbon “*naciera*” oni tradukas en esperanton pere de os-formo, ĉar tio sendube okazos estontece.



La numero 100-a de nia revuo aperos dum la somero de la jaro 2013.

Ĉu Vi deziras kunlabori kun tiu numero?

Ni invitas al ĉiuj geesperantistoj kunlabori pere de artikolo, desegnaĵo, rakonto aŭ kia ajn kunlaboraĵo.

*Se Vi estas preta kunlabori kun ni, bv. kontakti kun:
esperanto14@ono.com*

Por kontakti kun la Esperanto-Movado en Andaluzio, bv. uzi jenajn elektronikajn adresojn:

- ✓ Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
andaluciaesperanto@gmail.com
- ✓ Malaga Esperanto-Asocio “Marbordo de la Suno”
<http://www.ipernity.com/home/123729>
- ✓ Asociación Sevillana de Esperanto
info@esperantosevilla.org
- ✓ Asociación Cordobesa de Esperanto
esperanto14@ono.com
- ✓ Jaena Esperanto-Asocio
ridinda@gmail.com
- ✓ Club de Esperanto de Ronda
esperantoarunda@gmail.com
- ✓ Asociación Onubense de Esperanto
rafimagon@yahoo.com
- ✓ Esperanto el Kadizo
esperantokadizo@gmail.com
- ✓ Bulteno “Monate ĉe Vi”
angelarquillos@gmail.com
- ✓ Revuo “Gazeto Andaluzia”
esperanto14@ono.com



TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.com

POEZIO

Sian ridon
montris la ĝardeno verda,
kiam falis sur ĝin pluvo,
larmoj sur la floroj blankaj,
dum vekigis la mateno.

Jen lekanto,
ridas ĝi kun blankaj dentoj,
kaj la branĉo, se ĝi dancas,
sentas grandan emocion.
Verŝu vinon,
venas perloj kaj aŭroro,
ha, se nokt-serur' rompiĝus,

nokto-vojaĝantoj vidus
klaran lumon en tenebro !

Belulino, ho gazel' naiva, ĉarma,
kun vizaĝ' de luno plena,
ĉu la lumon vi komparas
al vizaĝ' de mia luno
kun korol' de blankaj floroj
kaj la buŝ' de perloj plena ?
Amatino,
vivos vi en mi eterne,
mortus mi por vi feliĉa !

Abu Ĵafar Ibn Jatima
Almerio 1324 – 1369

Esperantigis Antonio Marco Botella

Turismi en ... ÁLORA (Malago)

Álora estas vilaĝo en la provinco Malago. Ĉirkaŭita de la Siero Abdalajis, tiuj montoj preskaŭ izoliĝas la urbon, jen la kialo de la tiea homa setlejo jam en la neolitika periodo. La apero de surrokaj pentraĵoj en groto proksime al Álora kaj ankaŭ la eltrovo de hakiloj pravas, ke la homo okupis tiun lokon de ĉiam, ĉefe pro la facileco ĉasi bestojn. La iberoj nomis la lokon *Iluro* kaj la fenicoj ekstarigis la unuajn murojn de kastelo, kiu hodiaŭ estas unu el la plej belaj monumentoj en la urbo. La romianoj okupis la restaĵojn de tiu kastelo kaj ili konstruis fortreson. Álora havigis al la Romia Imperio kuraĝajn militistojn kiuj elstariĝis eĉ en Romo mem. La araboj alvenis en la jaron 711 kaj sur la restaĵoj de la romia fortreso ili konstruis alkazabon, tre simila al tiu kiu hodiaŭ estas videbla.



Blazono de ÁLORA

La kastiliaj reĝoj ĉiam deziris konkeri la kastelon, tiel la reĝo Alfonso la 8-a en la jaro 1184, kaj poste aliaj reĝoj en la jaro 1319 kaj 1407. En la jaro 1434 brava kastilia kapitano “Don Diego de Rivera” mortis dum batalo fronte al la kastelo de Álora, kaj tiu novaĵo inspiris baladon ankoraŭ hodiaŭ konata. En la jaro 1484 la Katolikaj Gereĝoj definitive konkeras la urbon kaj de tie ili marŝas en Granadon. La unua decido de la novaj kastiliaj regantoj de la urbo estis konstrui preĝejon sur la islama moskeo. Bedaŭrinde hodiaŭ restas malmulte de tiu

preĝejo, nur la ĉapeleto, ĉar tertremo detruis ĝin. En la jaro 1628 la vilaĝo Álora disiĝas de la malaga municipo, kaj tiam ĝi naskiĝas kiel sendependa urbo.

Dum la 19-a jarcento la Alora Urbodomo entuziasme adoptis la liberalan konstitucion de la jaro 1812, tamen en la jaro 1823 la franca armeo, apoganta la absolutisman reĝimon de la hispana reĝo, okupis la urbon, eksigis la urbestron kaj pafe detruis la memorigan ŝtonon fiksita sur la ĉefa turo de la preĝejo, la pafoj ankoraŭ estas videblaj ĉe la turo.

La komenco de la 20-a jarcento estis terura en Alora. La jaroj 1903 kaj 1904 estas konataj kiel “la jaroj de la malsato”, tio favoris la amasan elmigradon de la aloranoj ĉefe en Sudamerikon. Tiu elmigrado denove ripetiĝis dum la 50-jardeko, ĉi-foje en Eŭropon ĉefe Germanio kaj Svisio.

Nuntempe Álora estas vilaĝo kun preskaŭ 15.000 enloĝantojn, la ter-kulturo estas la plej grava vivo-rimedo de la urbo, ĉefe frukt-arboj kaj legomoj, kvankam lastatempe la kampara turismo estas grava fonto de enspezoj por la urbo, dank’al la apuda montaro.

Monumentoj

La Kastelo. Ĝi stariĝas sur la monteto *Las Torres*. Konstruita de la araboj, tamen la origino de tiu konstruaĵo estas fenica. Post la kristana konkero oni ekkonstruis tie preĝejon, tamen tertremo fine detruis ĝin.



Elstariĝas la ĉefa turo, antaŭ kiu mortis la kastilia kavaliro *Diego Gómez de Ribera* en la jaro 1434. Tiu epizodo de la kastilia konkero de Andaluzio estis poste diskonigata pere de mondfama balado.

La Monaĥejo de Nuestra Señora de las Flores. Je du kilometroj de Álora estas eble viziti antikvan monaĥejon, el kiu videblas beleĝa pejzaĝo. Ene de la preĝejo troviĝas la religia figuro de *Nuestra Señora de las Flores*, donacita de la kastilia reĝino Elizabeto la 1-a al la aloranoj en la jaro 1502



Monumento al Flamenka Kantaĵo: en Álora naskiĝis la flamenka kant-stilo konata kiel *malagueña*. Do, oni decidis starigi bronzan kaj ŝtonan monumenton al ĉi tiu flamenka kantaĵo. En la monumento starigas akvo fluanta el natura fonto kaj gitaro el bronzo.



Preĝejo *Nuestra Señora de la Encarnación*: post la malaga katedralo ĉi tiu preĝejo estas la plej granda en la provinco Malago. Unuamomente oni starigis ĝin sur la antikva islama moskeo, tamen la daŭra kreskado de la enloĝantaro igis necese ŝanĝi la lokon de la ĉefa preĝejo de la vilaĝo kaj konstrui alian tute nova. Ĉe ĝi okazas dum la paska vendredo la *despedía* (la adiaŭo), kiam ĉefrolulas la religiaj figuroj de Jesuo kaj la Virgulino Maria.

Festoj

Kiel dirite, pask-vendrede okazas la “*despedía*” (adiaŭo) inter la religiaj figuroj de Jesuo kaj Maria. La portantoj de ambaŭ figuroj surgernuiĝas dum ĉiuj preĝas patronian. Jen la plej grava momento de la Pasko en Álora.

La someraj festoj okazas la 8-a de septembro, honore al la Virgulino *de las Flores*, la sekvanta dimanĉo okazas pilgrimado tra la kamparo. Dum la monato julio okazas flamenka festivalo kie la kantaĵo *malagueñas* ĉefrolulas, ankaŭ estas eble aŭdi la tipajn fandangojn de Álora.

La festo de la supo *perota* estas jaron post jaro pli konata en la malaga provinco. *Perota* estas la popola nomo de la enloĝantoj de Álora. Okaze de la unua sabato de la monato oktobro, meze de la plej granda placo de la vilaĝo, oni memoras al la ter-kulturistoj kiuj, pasintece, laboris dum la tuta tago sur la kamparo. Oni kuiras tipan supon kaj eĉ pli ol 7.000 porciojn oni disdonas inter la ĉeestantojn.

Gastronomio

La gastronomio de Álora baziĝas sur la produktoj de ĝia fruktodona valo. Kiel dirite, famega estas la “sopa perota”, tipa manĝaĵo de la ter-kulturistoj. Al ĉi tiu supo kutime akompanas vinberoj, nopal-figoj, kukumoj, olivoj, oranĝoj kaj cepoj. Kiel dolĉaĵo

ankaŭ estas bongusta la pasteço de batato. La gazpaço en Álora estas konata kiel “*pimentón*”, kies ĉefa ingredienco estas la verda kapsiko.

Venont-numere Turismi en

Guadix (Granado)

Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Okaze de la 17-a Andaluzia Kongreso de Esperanto oni prezentos la lastan libron eldonita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Temas pri la poemaro *mediteraneaj eroj*, kies aŭtoro estas nia malaga samideano Ángel Arquillos López. Temas pri aro da mallongaj poemoj kaj kelkaj hajkoj kies ĉefa motivo estas la sentoj, la vivo, la amo, la feliĉo...

Ni invitas al Vi ĝui la verkon.




Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

La Arkitektura Vortaro de Francisko Azorín Izquierdo

En la jaro 1932 la kordova esperantisto Francisko Azorín eldonis la imponan verkon *Universala Terminologio de la Arkitekturo (Arkeologio, Arto, Konstruo kaj Metioj)*. La libro enhavas 841 difinojn, apud ili aperas la etimologion de ĉiu vorto, foje devenantaj de la latina aŭ la klasika grek-lingvo, kaj kelkaj el ili ankaŭ de la araba, sanskrita, egipta, kelta aŭ gaela. La aŭtoro ankaŭ aperigis la tradukon de ĉiu vorto en la hispana, portugala, itala, franca, angla, germana, kaj foje eĉ en la pola kaj rusa lingvojn. Aperas la difino de ĉiu vorto en esperanto kaj apud multaj el ili eĉ desegnaĵo. Entute aperas 942 bildoj, multaj el ili faritaj de la aŭtoro mem, kaj kvankam li mencias sur la kovrilo, ke aperas sur la libro pli ol 2.000 desegnoj, la nombro ne mensogas, pro la fakto, ke multaj el la bildoj estas formataj de du aŭ pliaj desegnaĵoj.



Kiam L.L. Zamenhof proponis la lingvon en la jaro 1887 ne ekzistis specifaj vortaroj pri teknikaj sciencoj, do, estis la tasko de la unua geesperantistoj, fakuloj pri sciencoj kaj artoj, redakti tiujn vortarojn. Francisko Azorín Izquierdo, aktiva esperantisto en la urbo Kordovo, socialista deputito kaj ankaŭ arkitekto de la Kordova Urbodomo, decidis kolekti ĉiujn vortojn rilataj al sia laboro, tio estas la arkitekturo. Kiam li eldonis la libron jam ekzistis specifaj vortaroj pri aliaj sciencoj, tiel pri ĥemio, anatomio, medicino, matematiko, navigado, fotografio, ktp.

La kontribuo de Francisko Azorín al esperanto, dank'al ĉi tiu vortaro estis tre grava. Kompreneble en la literaturo aŭ revuoj en la tiam juna internacia lingvo oni ne povis sukcese trovi mil vortojn rilataj al arkitekturo, do, estis tasko de Azorín ne nur kompili ĉiujn vortojn pri ĉi tiu fako, sed ankaŭ krei aliajn novajn, ĉar ne ekzistantaj tiumomente.



Francisko Azorín Izquierdo
Kordova esperantisto

Tion konfesas la aŭtoro en la antaŭparolo de la verko; tio estas, ke li mem devis serĉi vortojn kun similaj elementoj en diversaj lingvoj kaj tiel proponi sian adopton en esperanto pere de la vortaro, kompreneble ĉiam kun respekto al la Zamenhofa Fundamento. Eĉ aperas sur la terminologio vortoj de tiutempaj novaj produktoj rilataj al la arkitekturo, ekzemple la vorto “*uralito*”, difinita kiel “*emulsio de cemento kaj asbesto uzita por fabriki diversajn konstruelementojn, tubojn, tegolojn, k.c.*”. Sciu, ke ĉi tiu konstruelmento aperis en la jaro 1907, do nur malmultaj jaroj antaŭ la eldono de la vortaro.

Alia grava atingo de la arkitektura vortaro de Azorín estis la eldono de vera ilustrita vortaro. Kiel dirite, pli ol 2.000 desegnaĵoj aperas sur ĝi. Li sciigas nenion pri la aŭtoreco de la desegnaĵoj, tamen, ĝia utiligo atingis klarigi ĉiujn vortojn kaj foje eĉ aldonas kromajn elementojn al la difinita vorto. Oni devas diri, ke Francisko Azorín ne forgesis sian urbon Kordovon en la vortaro, tiel, apud kelkaj vortoj aperas desegnaĵoj klare ligitaj al tiu urbo. Apud la vorto *Minareto* kaj *Moskeo* li aldonas al la difino desegnaĵon montranta la blazono de la

urbo Kordovo, kie efektive aperas la minareto de la moskeo. Same, rilate la vorton *Maksuro*, kun klariganta bildo kie aperas la ankaŭ la kordova moskeo.

Kompreneble Francisko Azorín ricevis kunlaboradon por redakti la verkon, la kvalito de la kunlaborantoj pruvas ankaŭ lian gravecon ne nur kiel esperantisto sed ankaŭ kiel arkitekto. Tiel helpis lin Francisco Costa, direktoro de la portugala revuo *Arquitectura*; same, la Profesoro Bruno Canatieri, de la itala Universitato de Parma; la inĝeniero Ch. Tiard de Parizo kaj lia granda amiko, la germana Joseph Berger, kiu instruis la internacian lingvon al ĉiuj filoj de Francisko Azorín kiam li ankoraŭ loĝis en Kordovo.

Kiel surpapera verko la *Universala Terminologio de la Arkitekturo* de Francisko Azorín estas hodiaŭ vera juvelo. Sed feliĉe, ne estas necese serĉi nun la libron en antikvaj arĥivoj aŭ bibliotekoj ĉar ekde antaŭ kelkaj monatoj la bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio skanigis la libron kaj metis ĝin je la dispono de ĉiuj dezirantaj koni ĉi tiu maljuna sed valora verko. Jen la situo de la libro en interreto:

<http://hdl.handle.net/11013/2636>



Historia Arĥivo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Apartado de Correos 611

14080 Córdoba ~ esperanto14@ono.com

ANDALUZA KUIRARTO

Sopa Perota (supo laŭ la stilo de Álora)

Sur la paĝoj pritraktantaj ĉi-numere la malagan vilaĝon *Álora*, oni parolis pri tipa manĝaĵo konata kiel “*sopa perota*”, tio estas: supo laŭ la stilo de *Álora*. Jen recepto por prepari ĝin. Tamen, sciu, ke temas pri manĝaĵo speciale pripensita ne por unu persono, eĉ ne por du, do jen la ingredientoj



por 10 personoj.

Jen la necesaj ingredientoj:

- 1 kilogramo da pano dispecigita.
- 1 kilogramo da tomatoj.
- 250 gramoj da verdaj kapsikoj.
- 250 gramoj da cepo.
- 250 gramoj da asparagoj.
- ½ kilogramo da terpomoj.
- ½ litroj da oliv-oleo.
- 2 litroj da akvo.
- Salo

Jen la preparado:

Ni fritas la terpomojn, kiam frititaj ni apartigas ilin. Ene de la sama fritita oleo ni enmetas la verdajn kapsikojn, la cepon kaj la asparagojn.

Post kelkaj minutoj ni aldonas la tomatojn kaj iomete da salo (ĉi tiu lasta laŭ via prefero), fine ni enmetos la jam frititajn terpomojn.

Fine, ni verŝos la akvon kaj kiam la tutaĵo bolos ni aldonos la tutan dispecigitan panon. Post kvin minutoj la *perota* supo estos preparata. Oni povas akompani ĉi manĝaĵon pere de oranĝoj, olivoj kaj nopal-figoj.


Memoru, ke la plej bongustaj supoj oni preparas en Ālora dum la unua sabato de la monato oktobro okaze de tipa festo kaj sciui, ke ĉiuj estas invitataj.



FLAMENKO

Juan Habichuela, flamenka gitar-ludisto.

La flamenkan arton oni diskonigas ĉefe pere de tri elementoj: la kantaĵoj, la dancado kaj la gitar-ludado. Hodiaŭ ni parolas pri ĉi-lastaj kaj ĉefe pri unu el la plej grandaj flamenkaj gitar-ludistoj Juan Habichuela.



Juan Carmona Carmona naskiĝis en Granada en la jaro 1933, li apartenas al grava flamenka dinastio, kiun komencis lia avo konata kiel “Habichuela el Viejo”, Juan Carmona prenis la kromnomon de sia avo kaj tiel li estas konata kiel “Juan Habichuela”.

Unuamonte, li estis flamenka dancisto, tamen lia patro, José Carmona, kune kun alia granada gitar-ludisto “El Ovejilla” instruis al li la arton ludi la flamenkan gitaron. La fama flamenka dancisto Mario Maya enirigis lin en sia kompanio, kaj dank'al tio en la jaro 1956 li ekludis en Madrido. Tie, li akompanis kun sia gitaro al la plej gravaj flamenkaj kantistoj de la 20-a jarcento. Li eĉ ludis en Novjorko en la jaro 1964, akompanita de la kantisto Fosforito kaj la dancistino Manuela Vargas. En la jaro 1974 li ricevis premion okaze de la Nacia Konkurso de Flamenka Arto okazinta en Kordovo. Tamen, malgraŭ ĉi ĉiuj sukcesoj li ne sonbendigis sian unuan diskon ĝis la jaro 1999 sub la titolo “*Juan Habichuela. De la Zambra al Duende*”.

Laŭ la aserto de flamenkaj fakuloj, la plej grava karaktero de la gitar-akompanado de Juan Habichuela estas la humileco de lia ludado apud la kantisto, Juan Habichuela donas la unuan rangon al la kantisto, li nur akompanas lin, kvankam li ne dubas zorgeme helpi la kantiston pere de la notoj de sia gitaro. Li estas granda majstro se oni parolas pri la komenco de la ludado, kiam la kantisto devas trovi la ekzaktan sekundon por ekkanti.

Nuntempe li esas unuanime agnoskita kaj respektata inter ĉiuj flamenkaj artistoj kaj sendube li estas la plej bona gitaristo ene de la flamenka mondo.



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Unu el la saĝuloj aperanta sur la Biblio, ĉu andaluzo?

Ĝus aperis la lasta libro de la trilogio verkita de la Papo Benedikto la 16-a pri Jesuo, sub la titolo: *La infan-aĝo de Jesuo*. Sur la 4-a ĉapitro de la libro la Papo pritraktas la figurojn de la saĝuloj kiuj vizitis la ĵus naskitan bebon Jesuo kaj oferis al ili donacojn.



Unue, oni devas diri, ke la evangelio parolas pri *saĝuloj* neniam pri reĝoj, same aperas neniuj konkreta nombro da ili. Tiel, sur la Evangelio de Sankta Mateo aperas:

2. Kaj kiam Jesuo estis naskita en Bet-Leĥem de Judujo en la tempo de la reĝo Herodo, jen saĝuloj el la oriento venis al Jerusalemo, dirante: Kie estas tiu, kiu estas naskita Reĝo de la Judoj? Ĉar ni vidis lian stelon en la oriento, kaj venis, por adorkliniĝi al li....

Kaj veninte en la domon, ili vidis la knabeton kun lia patrino Maria, kaj adorkliniĝis al li; kaj malferminte siajn trezorojn, ili faligis sin kaj prezentis al li donacojn: oron kaj olibanon kaj mirhon.

Do, la tradicio asertas, ke ili estis tri, sed nur pro la fakto, ke oni donacis tri objektojn: oron, olibanon kaj mirhon. Tradicie oni admisias ankaŭ, ke se temas pri tri saĝuloj, aŭ pri tri reĝoj, ili alvenus el la tri konataj kontinentoj dum tiu epoko, tio estas: Azio, Eŭropo kaj Afriko. Tamen, kiel dirite, aperas sur la Biblio nek pri la origino, nek pri la ekzakta nombro da tiuj saĝuloj kiuj adorkliniĝis kaj donacis al Jesuo.

Tamen, la Papo Benedikto la 16-a en sia ĵus publikigita libro diras, ke la tradicio de la Eklezio tutnature akceptis la rakontadon de la naskiĝo de Jesuo laŭ la diraĵo de la Profeto Jesaja (konkrete ĉapitro 1.3), tiel oni havigis en la reprezento de la naskiĝo la figurojn de la bovo kaj la azeno, same oni komprenis la rakonton de la Saĝuloj laŭ tio dirita sur la psalmo 72.10 kaj Jesaja 60. Laŭ tiuj tekstoj, tiuj kiuj iris donaci al Jesuo estis reĝoj. Konkrete, la Profeto Jesaja diris:

73.10 La reĝoj de Tarŝiŝ kaj de la insuloj alportu donacojn; la reĝoj de Ŝeba kaj Seba venigu donojn. Kliniĝu antaŭ li ĉiuj reĝoj.

Do, tiuj saĝuloj estus ekzakte tri reĝoj, kaj ili alvenus el la afrika Ŝeba, el la araba Seba kaj el la andaluza Tarŝiŝo. Laŭvorte, la libro de la Papo Benedikto la 16-a diras, ke la promeso kiun enhavas ĉi tiuj tekstoj etendigas la originon de ĉi tiuj homoj ĝis la plej fora okcidenta regiono (Tarŝiŝo en Hispanio), tamen la tradicio poste disvolvigis la anoncon de la universalecon de la reĝlandoj de tiuj suverenoj, sub la kompreno, ke ili estis reĝoj de la tri kontinentoj tiam konataj: Afriko, Azio kaj Eŭropo.

Ĉu tio signifas, ke la saĝuloj aŭ la reĝoj adorantaj Jesuon kiam li naskiĝis estis andaluzoj, aŭ almenaŭ unu el ili? La ĵurnaloj lastatempe tion mokeme asertas, ĉar la Papo tion diras. Kompreneble, tio ne estas tute ekzakta, ĉar la Papo diris nur, ke se oni komprenas la momenton de la naskiĝo de Jesuo laŭ la interpretado de la Profeto Jesaja, tiam unu aŭ kelkaj el la reĝoj kiuj vojaĝis en Betlehemon, venis de Tarŝiŝo, kvankam ankaŭ aliaj de Ŝeba kaj de Seba. Sed ja, kuriozas la ideo, ke unu el la adorantoj de la bebo Jesuo estis andaluzo. Tamen, kio estas reale tute certa, estas la fakto, ke jam antikva reĝlando citita sur la Biblio ekzistis sur tiu loko kiu hodiaŭ nomiĝas Andaluzio, ĝuste sur la nuntempaj provincoj Onubo, Kadizo kaj Sevilo.

Solvo al la krucvortenigmo de la numero 95-a

	1	2	3	4	5	6
A	H	I	M	N	O	J
B	I	R	I		L	O
C	N	E		E		V
Ĉ	D	L	A	S		I
D	I	O		T	U	L
E	O	K	S	I	D	O

ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: andaluciaesperanto@gmail.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe unu el la jenaj kontoj:

- Caja General de Ahorros de Granada
2031 0225 54 0100187657
- BBVA
0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2012

DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Seviljo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonanto de Seviljo: José Roldán León
Voĉdonanto de Malago: Karmela San Segundo Cordero
Voĉdonanto de Onubo: Rafael Mateos González
Voĉdonanto de Arundo: Fátima Jiménez García
Voĉdonanto de Jaeno: Nomumota
Voĉdonanto de la Malaga Akserkio: Nomumota
Voĉdonanto de la Junularo: Juan Diego Díaz Bautista

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net



17-a ANDALUZIA
KONGRESO DE ESPERANTO
GRANADO



De la 15-a ĝis la 16-a
DECEMBRO 2012



Patronato de la Alhambra y Generalife
CONSEJERÍA DE CULTURA Y DEPORTE

Web: www.esperantoandalucia.com

Blog: www.andaluciaesperanto.blogspot.com